# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-23 n-ro 394

# Ĝenerala Asembleo de UN adoptis rezolucion pri statuso de Jerusalemo



EU pluvalidigis sankciojn kontraŭ Rusio por pliaj ses monatoj

Jemeno: 1000 tagoj da konflikto en indiferenteco

Junulino venkinta en scienca konkurso preferas lerni interrete ol lerneje

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus Open Source Desktop Publishing

## Ĝenerala Asembleo de UN adoptis rezolucion pri statuso de Jerusalemo
*Karaktero, statuso aŭ demografia konsisto de la sankta urbo p. 03*

## EU pluvalidigis sankciojn kontraŭ Rusio por pliaj ses monatoj
*En julio de 2014, la EU enkondukis ekonomiajn sankciojn kontraŭ Rusio p. 03*

## Jemeno: 1000 tagoj da konflikto en indiferenteco
*8 750 mortintojn kaj dekojn da miloj da vunditoj p. 04*

## Serbio: atendo-lando de migrantoj, kiuj aspiras al Eŭropo
*Miloj da migrantoj estas blokitaj en Serbio p. 05*

## Ĉu vi jam vidis tiun GIFojn?
*Psikologia fenomeno nomita sinestezio p. 06*

## Junulino venkinta en scienca konkurso preferas lerni interrete ol lerneje
*Filipina lernantino p. 07*

## Hodiaŭe
*Gregório de Matos; Iván Mándy; Juan Ramón Jiménez; Martin Opitz; kaj Ekvadoro p. 07*

# Ĝenerala Asembleo de UN adoptis rezolucion pri statuso de Jerusalemo

La Ĝenerala Asembleo de UN ĵaŭde [21 dec 2017] adoptis rezolucion pri la statuso de Jerusalemo, kiu igos la decidon de usona prezidento Donald Trump pri agnosko de Jerusalemo kiel la israela ĉefurbo ne havi leĝan efikon.



En malofta urĝa speciala sesio, la projekto de rezolucio, prezentita de Turkio kaj Jemeno, estis adoptita per la rezulto de 128 voĉoj kontraŭ 9, kun 35 sindetenoj.

La naŭ landoj, kiuj voĉdonis kontraŭ la projekto, estis Gvatemalo, Honduro, Marŝalaj Insuloj, Mikronezio, Nauro, Palaŭo, Togolando, Usono kaj Israelo.

La rezolucio asertas, ke ajnaj decidoj kaj agoj, kiuj intencas ŝanĝi la karakteron, statuson aŭ demografian konsiston de la sankta urbo Jerusalemo, ne havas leĝajn efikojn, estas nevalidaj kaj devas esti nuligitaj laŭ rilataj rezolucioj de la Sekureca Konsilio, kaj ĉi-rilate vokas al ĉiuj ŝtatoj ne starigi diplomatiajn misiojn en Jerusalemo.

Ĝi plu postulas, ke ĉiuj membroŝtatoj de UN observu rezoluciojn de la Sekureca Konsilio pri Jerusalemo, kaj ne agnosku agojn aŭ rimedojn, kiuj malobeas tiujn rezoluciojn.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# EU pluvalidigis sankciojn kontraŭ Rusio por pliaj ses monatoj

La Eŭropa Unio ĵaŭde [21 dec 2017] oficiale decidis pluvalidigi siajn ekonomiajn sankciojn celantajn specifajn sektorojn de la rusia ekonomio por pliaj ses monatoj, malgraŭ ripetaj avertoj de Moskvo pri malbonigo de rilatoj.



La Konsilio de la Eŭropa Unio unuanime oficialigis la longigon, bazitan sur la freŝa raporto de la franca kaj germana gvidantoj al la Eŭropa Konsilio en la lasta semajno. Ili diris, ke la Minskaj Interkonsentoj ankoraŭ ne estis plene efektivigitaj.

La rimedoj limigas la aliron de kvin ĉefaj rusiaj gravaj ŝtataj financaj institucioj kaj iliaj filioj establitaj ekster la EU kaj ankaŭ tri ĉefaj rusiaj prienergiaj kaj tri defendaj kompanioj al la primaraj kaj sekundaraj kapitalmerkatoj de la EU.

En julio de 2014, la EU enkondukis ekonomiajn sankciojn kontraŭ Rusio je la preteksto, ke ĝi kreis malstabilecon en orienta Ukrainio, kaj du monatojn poste ĝi grandigis la ekonomiajn sakciojn. Rusio prenis kontraŭrimedojn, inkluzive de limigo de importado de agrikulturaj produktoj el la EU.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Jemeno: 1000 tagoj da konflikto en indiferenteco

Miliono da kazoj da ĥolero, ses infanoj, kiuj mortas ĉiuhore, kaj 8% el la loĝantoj en malriĉeco: la milito en Jemeno, kiu komencas hodiaŭ sian milan tagon, ĵetis la landon en gravan humanitaran krizon. La NeRegistaraj Organizaĵoj alvokas al mobilizado.



Jemeno komencis merkrede la 20-an de decembro sian milan tagon de la milito. La lando estas scenejo de la «plej grava humanitara krizo en la mondo», kaj milionoj da personoj estas rekte minacataj de malsatego, laŭ UN kaj pluraj NROj. La konflikto, kiu kontraŭstarigas de marto 2015 la araban koalicion gvidatan de Saud-Arabio al la ŝijaismaj ribeluloj hutioj, kaŭzis pli ol 8 750 mortintojn kaj dekojn da miloj da vunditoj.

La NROj, senĉese alarmas pri la graveco de la humanitara kaj sanitara situacio, kiu regas en tiu lando, unu el la plej malriĉaj en la mondo. Pro manko de trinkebla akvo, milionon da jemenanoj trafis ĥolero, kiu kaŭzis de fine de aprilo, pli ol 2000 viktimojn.

«Tiu konflikto estas konsiderata kiel nevidebla konflikto, forgesita de la mondo, bedaŭras Liny SUHARLIM, direktorino de la NRO *Acted* en Jemeno. Tio estas krizo, kiun la tutmonda loĝantaro ĵus malkovras, kaj la sola humanitara laboro neniam estos la solvo». Laŭ ŝi, politika solvo kaj intertraktado pri paco estas «la sola rimedo por eliri el tiu nuna situacio».

La NROj petas kompletan interrompon de la blokado, devigata de novembro de Saud-Arabio. La 4-an de novembro, la misilpafo al la sauda ĉefurbo estigis fermon de ĉiuj jemenaj havenoj kaj flughavenoj. Tio pligravigis la nutraĵmankon.

«Jemeno spertas nutraĵkrizon, senprecedencan en la mondo, diras Jamie MCGOLDRICK, humanitara kunordiganto ĉe UN en Jemeno. Preskaŭ 18 milionoj da personoj bezonas nutraĵhelpon, 11 milionoj el kiuj - urĝe Tio estas miliono pli ol pasintjare».

Malgraŭ la misilo pafita de la hutiaj ribeluloj, la koalicio pluigis la malfermitecon de la haveno de Hodejdo, la ĉefa enirejo de la nutraĵoj kaj humanitara helpo, dum monato.

Neniam Milito Inter Ni

# Serbio: atendo-lando de migrantoj, kiuj aspiras al Eŭropo

Malgraŭ la oficiala fermo de la balkana vojo, miloj da migrantoj estas blokitaj en Serbio. Ili esperas trapasi la landlimon por atingi Eŭropan Union.

Iom da varmo, nutraĵoj, kaj neŝancelebla espero.

En Serbio, apud la kroata landlimo, pluraj centoj da migrantoj travivos plian vintron ekstere, kun ununura celo: atingi la Eŭropan Union.

Plejparte el ili jam provis tion dekojn da fojoj, antaŭ ol esti forpuŝitaj de la polico. Por tiuj viroj, ju pli la tempo pasas, des pli la bonŝancoj de sukceso malkreskas: la landlimoj estas pli strikte protektataj, la migrantoj malfortiĝas, malsaniĝas kaj mono maloftiĝas.

«Tiuj homoj plu vivas ekstere en nehumanaj kaj danĝeraj vivkondiĉoj, kiel vi vidas, eksplikas Andrea Contenta, kiu reprezentas la organizaĵo "Kuracistoj sen landlimoj". Aliro al akvo aŭ sanitaraj instalaĵoj ne vere ekzistas, kaj unu fojon pli, tio estas demonstrado, ke ni ne havas sekurajn rimedojn por vojaĝi tra Balkanoj. Ni ne povas plu diri, ke la balkana vojo estas fermita. Ni devas agnoski, ke homoj plu staras en Balkana duoninsulo».

De post la oficiala fermo de la balkana vojo en marto 2016, la nombro de migrantoj, blokitaj en Serbio ne vere malkreskis. Ili ŝajne estas 5 000, blokitaj ĉe la pordoj de Eŭropo. Ĉiuj rimedoj estas uzeblaj: perpiede, kaŝitaj




en kamiono, en la ĉasioj de vartrajnoj aŭ sur ties tegmento…

Kaj laŭ la reprezentantoj de "Kuracistoj sen landlimoj", «la aranĝoj pri malinstigo ne haltigos tiujn homojn».

Laŭ raporto pri internaciaj migradoj publikigta lunde [18 dec 2017] de UN, okaze de la Internacia tago de la migrantoj, 258 milionoj da personoj ne vivas en sia naskiĝa lando, t.e kresko je 49% en daŭro de 17 jaroj. 3,4% el la loĝantoj de la planedo estas hodiaŭ internaciaj migrantoj.

Neniam Milito Inter Ni

# Ĉu vi jam vidis tiun GIFojn?

Ĉu vi aŭdas tiun GIFon? (vidu) Tiu stanga demando okupas multajn interretulojn.

Kiam mi vidis ĝin, la unuan fojon, mi preksaŭ falis el mia seĝo! Mi aŭdis la sonon de la metalkolono falanta sur la grundo! La problemo estas ke tiu sono tute ne ekzistas! Fakte, la GIFo estas sensonaj sinsekvaj bildoj, tial ne eblas aŭdi ion ajn. Tamen kiel 22% el populacio mi aŭdas ion!



Tio eblas pro psikologia fenomeno nomita *sinestezio* kiu kaŭzas aŭdajn iluziojn.

Estas la eblo por certaj personoj aŭdi movantajn objektojn eĉ kiam estas nenia bruo. Laŭ tiu difino, estas malsevera SINESTEZIO.

Pro la movo de la piliero, oni atendas ke la piliero peze refalis sur la grundon kaj tiu atendo kontribuas al reago de nia aŭda cerbokortekso.

Ekzistas pli severaj *sinestezioj* trafantaj ĉirkaŭ 4 elcentojn de la loĝantaro. Unu el plej famaj personoj trafitaj de severaj *sinestezioj* estas Daniel TAMMET, aŭtismulo kiu kapablas lerni lingvon en unu semajno. Li verkis libron legindan kies titolo estas "*Mi naskiĝis en blua tago*". Li estas trafita de parola, vida kaj nombra sinestezioj. Kiam li vidas nombron, ĝi ĉiam estas kolora, kaj por li, jaŭdo estas blua tago. Li uzas tiun fenonemon por enmemorigi kaj lerni.

Danke al lia nombra *sinestezo* li enmemorigis kaj senerare recitis en 5 horoj kaj 9 minutoj, la 22 514 unuajn decimalojn de Pi.

La deveno de la malsevera *sinestezio* eble estus la medio dum la infanaĝo. Ni keskas en medio kie movoj kaj bruoj estas tre ofte ligitaj tial ni tre frue asocias la movojn kaj la bruojn. Kvankam tiu estas la ĉefa hipotezo, la fenomeno restas tre malbone komprenata.

Fontoj: sciencesetavenir.fr
fr.wikipedia.org

Esperantologio: *Sinestezo* estas la traduko de *Synesthesia* (angla vorto) Mi trovis ĝi en Esperana-angla medicina terminaro (2006). Yamazoe SABURRO. Mi nenion trovis en vortaro.net nek en reta-vortaro. Vikipedio proponas *"Sinestezio"*.

ISAE

# Junulino venkinta en scienca konkurso preferas lerni interrete ol lerneje

La 18-jaraĝa filipina lernantino Hillary ANDALES venkis konkurson kun kandidatoj el 178 landoj, gajninte sciencan premion nomatan "*Breakthrough Junior Challenge*" [Gejunulojn- Antaŭniga Defio], kreitan de Mark ZUCKERBERG kaj ties edzino. Per 3-minuta filmeto ŝi sukcesis simplamaniere klarigi la teorion de la relativeco de Alberto EJNŜTEJNO.

"Mi plibonigas mian klerecon pere de familia diskutado – ni ĉiuj estas studemuloj – dokumentaj filmoj, retserĉadoj, jutubfilmetoj kaj libroj. Mi sentas, ke mi spertas pli da libereco ĉi tie ol en lernejo. Tia lernado ŝajnas al mi pli vera ol tiu ĉe klasĉambro, ĉar mi povas kontentigi mian scivolemon serĉante respondojn al miaj duboj", ŝi diras.

Tiu premio konsistas jene:
250 mil usonaj dolaroj al Hillary por kursoj post mezlernejo;
100 mil usonaj dolaroj al la laboratorio de ŝia lernejo;




50 mil usonaj dolaroj al iu instruisto inspiriginta ŝin.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



## Bildo de la tago

**Kito, ĉefurbo de Ekvadoro.**

**Jen la strato *García MORENO* en la historia centro de la urbo.**

**Vikipedio**




## Gregório de Matos

**Gregório de Matos Guerra (Gregorjo de Matos) (1636-1695) (* Salvador, en la 23-a de Decembro 1636 - † Recife, Pernambuko, en la 26-a de Novembro 1695), alnomita La infero-buŝa aŭ la braĝo-buŝa. Li estas rigardita kiel la plej granda poeto de la baroka kultura movado kaj la plej grava satirstila poeto ene de la portugallingva literaturo dum tiu periodo.**

**Vikipedio**


## Iván Mándy



**Iván Mándy [mAndi], hungare Mándy Iván estis hungara verkisto kaj scenaristo. Naskiĝis la 23-an de decembro 1918 en Budapeŝto kaj mortis la 6-an de oktobro 1995 en Budapeŝto.**

**En Esperanto aperis novelo en *Hungara Antologio*.**

**Vikipedio**



## Juan Ramón Jiménez

**Juan Ramón Jiménez (naskiĝis la 24-an de decembro 1881 en *Moguer*, Onubo (Hispanio) kaj mortis la 29-an de majo 1958 en *Santurce*, Portoriko) estis famega kaj tre bonkvalita hispana poeto. En 1956, la Sveda Akademio donis al li la Premion Nobel pri Literaturo.**

**En Esperanto aperis: *Platero kaj mi; La plugilo iras al la ĝoja tasko de la paco*.**

**Vikipedio**

## Martin Opitz



**Martin Opitz [martin opic] (n. la 23-an de decembro 1597 en *Bunzlau*, m. la 20-an de aŭgusto 1639 en Dancigo) estis germana poeto.**

**En Esperanto aperis: *Epigramo; Carpe diem; Al la amatino.***

**Vikipedio**